

Pura naturo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-826/295, 1979 aŭgusto 09 kaj 11
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-44/SRI-1979-44-B-4-295-826-1979-08-09-11-Claude-kaj-Andree-Gacond-Pura-naturo.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Kiam ni promenas en Svislando kun fremdaj gastoj, ofte ni aŭdas ilin laŭdi la purecon de nia lando. Ĉisomere mi gvidis studsemajnon, kiu permesis intimiĝi kun la ĵurasa montaro. Ĝin frekventis esperantistoj el Finnlando, Francio, Irano, Usono kaj Svislando. Plurfoje, kiam ni promenis en vilaĝo aŭ vagadis en paŝtejoj kaj arbaroj aŭ kiam ni ripozis ĉe belvidejo, aŭdiĝis admirvortoj ne nur pri la pejzaĝoj mem, sed ankaŭ pri ilia pureco. Kelkaj partoprenantoj eĉ informiĝis pri la sekreto de la svisa pureco, kiun ili kredas hereda. Ili fakte miris, kiam mi devis respondi, ke en mia junaĝo ne tiel pura kiel nun estis la urbo-stratoj aŭ la kamparo, kaj ke ni neniel troviĝas antaŭ hereda fenomeno, sed antaŭ la pozitiva rezulto de la nelacigebla laboro de la pioniroj de la natur-protektado.

A.- Jes, antaŭ ol la natur-protektado fariĝis laŭmoda sub la pedanta nomo de ekologio,

Cl.- (la manieroj ĉiam ŝatas la neologismojn)

A.- Natur-amantoj suferis vidi la belecon de la pejzaĝoj iompostiom detruitaj de senkarakteraj konstruaĵoj, de modernigoj rompantaj la natur-ekvilibrojn kaj de rubaĵoj dissemataj en la heĝoj borde de la vojoj kaj ĉe la randoj de la arbaroj. Ili provis reagi, kaj ilia admona krio baldaŭ haltigis la detruojn. Ĉiuj sin sentis iel ligitaj al la natur-protekta movado kaj al ties konstruiga programo.

Cl.- Hodiaŭ kun preskaŭ centmil kotizantoj, la Ligo Svisa por la Natur-protektado estas unu el la organizaĵoj, kiuj markas la svisan vivon. Kun la frata movado Ligo Svisa por la Nacia Heredaĵo, ĝi nelacigeble defendas kontraŭ malbeligaj aŭ detruaj agoj la kamparon, la montaron, la riverojn kaj la lagojn kaj la belajn domojn, kiuj estas konsiderataj kiel ĉies posedaĵoj.

A.- Se tiu natur-defenda kaj dom-defenda movado pli rapide kaj pli profunde influis la svisan popolon, ol la aliajn, estas tute certe dank' al la reklam-talento de ĝiaj pioniroj. Per originalaj kaj ĝenerale konstruigaj kampanjoj, ili rapide gajnis al si tre vastan publikon, kiu sentas sin koncernata de la proponitaj agadoj.

Cl.- La plej populara kampanjo estas tiu de la Ora Eskudo aŭ Ora Talero, kies profito permesas ĉiujare aĉeti novan protektindan pejzaĝon kaj renovigi savindajn domojn. Ĉijare la vendo de la Ora Eskudo permesos dediĉi 250'000 frankojn al la firmigo financa de la fondumo "Pro Saint-Ursanne", kies celo estas la protektado de unu el la plej belaj urbetoj de la montaro Ĵuraso. Tiu ĉi mono permesos subvencii la modernigon de la loĝejoj, por ke la urbeto restu vivplena sen arkitekturaj malbeliĝoj. Ĉiuj scias, ke la renovigo de mezepokaj domoj estas multekosta. La Fondumo "Pro Saint-Ursanne" prenos je sia ŝarĝo la elspezojn, kiujn la domprotektado trudas al la posedantoj, kiuj deziras plikomfortigi sian hejmon. Tiuj ĉi agadoj estas en Svislando ege popularaj kaj la Oraj Eskudoj, kiuj fakte estas manĝeblaj, ĉar

ĉokoladaj, fulmrapide aĉetiĝas. Ilin ĝenerale vendas la infanoj frekventantaj la elementan lernejon.

A.- Tiu ĉi agado vendi ĉokoladan eskudon envolvitan de orkolora alumina papero sur kiu estas arte presita la savota pejzaĝo naskiĝis dum la dua mondmilito. Tiam la balbutanta movadeto de la natur-protektantoj serĉis rimedon por altiri la atenton de la publiko favore al la kreo de nacia natur-parko en la kantono Grizono. Konstatinte ke kuŝis en la ĉokolad-fakrikoj tro granda rezervo de ĉokolado, la federaciaj aŭtoritatoj donis al la ligo por la natur-protektado la rajton vendi sen peti ĉokolad-kuponojn belajn grandajn ĉokolad-eskudojn. Grandan sukceson havis tiu ĉi vendo, kiu fariĝis tradicia, kaj la ligo por la natur-protektado mem kaj ties celoj tiel konatiĝis.

Cl.- Mi bone memoras tiun ĉi malnovan tempon. Mia patrino avino abonis la revuon de la ligo por la natur-protektado, kaj monaton post monato ŝi montradis ĝin al mi, laŭtlegante la subbildajn tekstojn, aldonante interesajn komentariojn. Foje, okaze de konkurso por varbi novajn membrojn, ŝi membrigis min, kaj mi tre fieris, kiam mi ricevis mian membrokarton kaj poste tute regule la monatan revuon, kiun mi atente kolektis. Tre verŝajne miloj kaj miloj da svisaj infanoj travivis saman eksperimenton: esti membro de vera societo kaj identiĝi kun ĝia sav-programo. Rigardante la fotojn, kiuj montris la aĉetitajn aŭ aĉetotajn natur-protektejojn, mi sentis min kunposedanto, kaj ankoraŭ nun, kiam mi vizitas unu el tiuj posedaĵoj de la ligo, mi sentas kvazaŭ religian respekton al ĝi. Jen kion mi lernis fariĝinte dekdujaraĝe membro-abonanto de Ligo Svisa por la Natur-Protektado. Ho, la kotizo ne estis ruiniga: se mi bone memoras, po du frankoj jare, kaj mia avino malavare donacis la duonon. Sed mi kotizis, kaj tio psikologie estis multo.

A.- Tiuj varb-kampanjoj, kiuj sin direktis per ege malaltaj kotizoj al la junularo, kaj la vendo de la Ora Eskudo, kiuj efektiviĝis tra la kanalo de la lernejoj, demonstras la lertecon de la pioniroj de la natur-protektado.

Cl.- En ĉiuj lernejoj troviĝis krome belaj bildoj de la floroj kaj bestoj indaj je protekto, kaj ni intimiĝis kun ili, kvankam ni ĝenerale ne havis la okazon ilin renkonti en la naturo.

A.- La instruistaro ricevis tra la kanalo de la lernejoj aŭtoritatoj konsilojn, kiujn malavare dissendis la ligo por la natur-protektado. Unu el ili koncernis la respekton de la pejzaĝoj okaze de lernejskurso. La instruistoj estis petataj atentigi siajn gelernantojn pri la neceso nek forĵeti la malplenajn botelojn, nek rompi ilin sur ŝtonoj, sed repreni ilin, por ke la piknikejo restu bela por la venontaj vizitantoj. Tiel komenciĝis en Svislando la eduko favore al pura naturo. La venontan semajnon ni daŭrigos nian priskribon de la aktiveco de Ligo Svisa por la Naturprotektado.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!